



共同

话语

# Mikrofone

8-a jaro • Oktobro-Decembero, 2010





## Redaktora mesaĝo

Estimataj legantoj! Nia kaj ankaŭ via kuriero "Mikrofone" fondita en 2003, ĉiam ricevas fortan subtenon kaj ĝuas vastan ŝaton de legantoj post sia apero.

"Mikrofone" estas jam fenestro, tra kiu viaj vortoj el letero kaj retmesaĝo karesas la okulojn de tutmondaj samideanoj.

Nun la distribua kvanto superas milon kaj centojn da ekzempleroj. En 2007 la kuriero fariĝis gazeto trimonata kaj, en la estonteco eble dumonata dank' al abundiĝo de viaj kontribuajfoj. Ni atendas vian pluan subtenon en la komuna redaktado!

Ja bonvenaj estas ĉiuj kontribuajfoj rilataj al nia disaŭdigo kaj la E-Movado. Ni kune deziru pli prosperan estontecon de nia Mikrofone!

# ENHAVO

## 3 Fermiĝis la Ŝanhaja Monda Ekspozicio 2010



## 5 Aleks Kadar: Mi kaj Ŝanhaja Monda Ekspozicio

## 10 Intervjuo Renato Corsetti: Agu en arablingvaj landoj

## 14 Tra la Mondo

## 15 Mikronovelo La Deziro de Infano

De la 1-a de januaro 2011 E-redakcio de ĈRI ŝanĝos aranĝon de la ĉiutaga elsendo. Ĉiutage inter lundo kaj vendredo estas la programeroj Tra la Mondo kaj Servaj Inforoj, kaj ankaŭ la rubriko Inter Ni. Cetere estas ankaŭ la muzika programero kaj lernado de la ĉina lingvo. Semajnfine ni aranĝas resuman raporton kaj havas pli longan muzikan programeron. Viaj opinioj kaj proponoj estas bonvenaj, ĉar ili ĉiam inspiras nin kaj perfektigas nian elsendon.

Krome, ni publikigas nian semajnan novaĵ-revuon Panorame en nia retejo esperanto.cri.cn. Jen estas ĝia retadreso <http://esperanto.cri.cn/radio/video.htm>. Bonvenaj estas viaj komentoj kaj eĉ kritikoj.



# Fermiĝis la Ŝanhaja Monda Ekspozicio 2010



“Ni kune pasigis 184 tagojn en la ekspozicio sukcesa, impona kaj neforgesebla. 190 landoj, 56 internaciaj organizoj, kaj ĉinaj kaj eksterlandaj entreprenoj ageme partoprenis en ĝi; pli ol 2 milionoj da volontuloj sindone faris kontribuon al ĝi; 73,08 milionoj da vizitantoj travivis ĝin. Ĉio ĉi kune kreis la brilon de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio. Tiu bela tempo vivos eterne en nia koro.”



Vespere de la 31-a de oktobro, plensukcese fermiĝis la Ŝanhaja Monda Ekspozicio 2010, kiu travivis 184 tagojn. Per siaj brilaj kaj riĉaj eksponadoj 246 landoj kaj internaciaj organizoj manifestis al la mondo ekspozicion sukcesan, imponan kaj neforgeseblan.

La Ŝanhaja Monda Ekspozicio metis al si perfektan finpunkton, post kiam ĉina ĉefministro Wen

Jiabao proklamis la fermiĝon de la ekspozicio.

"Mi proklamas, ke fermiĝis la Ŝanhaja Monda Ekspozicio 2010!"

Tiam tondras varmaj aplaŭdoj el la ĉeestantoj.

En la ferma ceremonio Wang Qishan, ĉina vicĉefministro kaj direktoro de la Organiza Komitato de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, faris ferman parolon. Li diris, ke la

ekspozicio estas partoprenitaj de 246 landoj kaj internaciaj organizoj, kiuj komune kreis la brilon de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio.

"Ni kune pasigis 184 tagojn en la ekspozicio sukcesa, impona kaj neforgesebla. 190 landoj, 56 internaciaj organizoj, kaj ĉinaj kaj eksterlandaj entreprenoj ageme partoprenis en ĝi; pli ol 2 milionoj da volontuloj sindone faris kontribuon



## Laŭreatoj venis al Monda Ekspozicio en Ŝanhajo

La 10-an de oktobro ok laŭreatoj de la speciala premio de la sciokonkurso "Renkontiĝo en Ŝanhajo, Brilado en Ekspozicio", komencis semajnan viziton al la ekspozicio. Ili persone spertos interŝanĝojn, kontaktojn kaj kunlaborojn inter malsamaj kulturoj.

De la 25-a de januaro ĝis la 1-a de aŭgusto Ĉina Radio Internacia, Kunordiga Buroo de Ŝanhaja Monda Ekspozicio kaj Ŝanhaja Radio kaj Televido kune okazigis la sciokonkurson "Renkontiĝo en Ŝanhajo, Brilado en Ekspozicio".



## Turismo de Ŝanhaja Monda Ekspozicio alportos ekonomian intereson je pli ol 80 miliardoj da juanoj

La 26-an de oktobro, estro de Ĉina Ŝtata Turisma Buroo Shao Qiwei malkaŝis en Ŝanhajo, ke turismo de Ŝanhaja Monda Ekspozicio alportos rektan ekonomian intereson je pli ol 80 miliardoj da juanoj.

En laborkunveno pri turismo de Ŝanhaja Monda Ekspozicio, Shao Qiwei diris, ke laŭ enketo fare de Ĉina Turisma Instituto, turismo de la ekspozicio alportos rektan ekonomian intereson je pli ol 80 miliardoj da juanoj. La postekspozicia efiko ludos netakseblan rolon en ĉina turismo.

al ĝi; 73,08 milionoj da vizitantoj travivis ĝin. Ĉio ĉi kune kreis la brilon de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio. Tiu bela tempo vivos eterne en nia koro."

Wang Qishan esprimis, ke la Ŝanhaja Monda Ekspozicio kunigis fruktojn akiritajn en la novigado de la homara civilizacio kaj proksimigis Ĉinion al la mondo. Ĉinio, pli malferma, pli tolerema, pli civilizita kaj pli progresema, kune kun la mondo, renkontas pli brilan estontecon.

En la ferma ceremonio Jean-Pierre Lafon, prezidanto de la Internacia Ekspozicia Buroo, esprimis, ke la Ŝanhaja Monda Ekspozicio estas granda sukceso kaj ankaŭ sukceso de la ekspozicia afero.

"La Ŝanhaja Monda Ekspozicio 2010 estas granda sukceso kaj ankaŭ sukceso de la ekspozicia afero. La ĉeftemo de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio 'Pli Bela Urbo, Pli Bela Vivo' herediĝos pluen post la fermiĝo de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio."

En la ferma ceremonio la



organizanto de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio transdonis la standardon de la Internacia Ekspozicia Buroo al Milano de Italio, kie okazos la ekspozicio en la jaro 2015. De tiam la monda ekspozicio eniris en la milanan tempon.

Okaze de la fermiĝo de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, Jose H. Villarreal, ĉefrepresentanto de la Usona Pavilono en la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, intervjuate esprimis, ke tiu ĉi ekspozicio ligis la tutan mondon al Ŝanhajo kaj kunĝuigis ĝin kun Ĉinio pri la disvolvaj fruktoj.

"Mi elkore esprimas mian gratulon al la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, ĉar ĝi akiris grandan sukceson en ĉiuj flankoj. Kaj ankaŭ la ĉeftemo de la ekspozicio estas plensignifa, ĝi sciigis al ni la gravecon de la daŭrigebla disvolviĝo kaj de la protektado de la tero."

Iom frue tiutage la Ŝanhaja Monda Ekspozicio okazigis la pintan forumon kun la temo "Urba Novigo kaj Daŭrigebla Disvolviĝo" kaj publikigis "Ŝanhajan Deklaracion". La deklaracio koncentras la komunan konon de diversaj partoprenantoj pri daŭrigebla disvolviĝo en la mondaj urboj, kaj ĝi estas grava frukto de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio. Laŭ la deklaracio la 31-a de oktobro estas difinita kiel "Tago de Monda Urbo".



# Aleks Kadar:

## Mi kaj Ŝanhaja Monda Ekspozicio



### Skizo de Aleks KADAR

Lerninte la lingvon en 1999 en Berlino, Germanio, mi tuj aliĝis al JEFO, la junulara franca Eo-asocio. Ekde mia esperantistiĝo mi okupis diversajn postenojn en landa aŭ internacia asocioj: Ĝenerala Sekretario de TEJO, Sekretario de JEFO, Sekretario de UFE (Esperanto France, la Landa Asocio en Francio), Kasisto de UFE kaj ĵus, Prezidanto de UFE. Krome mi aktivas en la eŭropa politika movado Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE), kies kasisto mi estis. Paralele mi tre aktivas en la reto, administras plurajn diskutlistojn. Gastigis dekon da esperantistoj per Pasporta Servo, vojaĝis uzante ĝin (Pollando, Germanio, Ukrainio). Partoprenis dekojn da renkontiĝoj: UK (1999, 2005, 2006, 2007, 2008, 2009), IJK (1999, 2001, 2003, 2004, 2005, 2007, 2008), Festo, IIF, IJS, EoLA, OKSEJT, Aroma Jalta ...

De la 8a ĝis 15a de oktobro 2010, mi, Aleks Kadar, franca esperantisto el Parizo, partoprenis al internacia semajno en Ŝanhajo. Tiu aranĝo estis kunorganizita de 3 ĉinaj instancoj : la Buroo pri la Monda Ekspozicio, iu Ŝanhaja Popola Radio kaj la Ĉina Radio Internacia (CRI). Temis pri semajno ĉirkaŭ premi-disdonado al gajnintoj de konkurso inter la diverslingvaj aŭskultantoj de CRI, « Renkontiĝo en Ŝanhajo kaj brilo de la Monda Ekspo ». Ni estis 8 kandidatoj, el 8 diversaj landoj : Litovio, Germanio, Bulgario, Italio, Belorusio, Vjetnamio, Japanio kaj Francio (Esperantio). Fakte estis 2 specifaj kazoj : la litova kandidato estis kvazaŭ reprezentanto de la angla redakcio kaj la franca estis sendito de la Esperanto-redakcio.

La semajno konsistis el 3 ĉefaj partoj : vizitado de la Ekspo, solena premi-disdona ceremonio kaj preparo de ĝi ; turismumado.

En la Ekspo mi vizitis kelkajn landajn (ĉinan, japanan, hispanan, francan) kaj kelkajn temajn (urba planedo, urba vivado, pavilono de estonto) kaj kompaniajn (Ŝtata Elektroreto / State Grid), Coca Cola, Ĉina Aviadila).

Dum la solenaĵo plej multaj kandidatoj kantis, ĉu sialingve, ĉu ĉine. Unu pantomimis. Mi prezentis lumbildaron pri mia unua vojaĝo al Ŝanhajo, akompanata de muziko el la franca kanto « Voyage Voyage. La 2 lastajn tagojn, merkrede kaj jaŭde, ni vizitis kelkajn vizitindaĵojn en la urbo. Mi revidis Waitan, la Nankinan straton, Yu Yuan... Unuafoje malkovris la SFMC-turegon, la ĝardenon en Yu Yuan. Ĝuis vesperan okul-ravan ŝip-promenon sur la rivero Huang Pu.

Resume, la semajno estis ege enhav- kaj emoci-riĉa, interesa kaj home, kaj ĉinkulture, kaj turisme, kaj lingve. Dankegon al Selena, kiu ebligis mian partoprenon kaj akompanis min ĝis mardo kaj al Ĝoĵa, kiu poste plenumis tiun malfacilan rolon de akompananto-interpretisto-raportisto. Shibo Hen hao! Ĉiutage mi laboris, ĉu skribante tagnotojn, ĉu kiel raportisto, filme, voĉe kaj intervjuje. Vi povas legi ĉi poste miajn tagnotojn surloke skribitajn ĉiuvespere dum la semajno.

## Antaŭflugaj impresoj (streĉo, streĉo, streĉo)

La mesaĝon mi titoligis komencante per kod-vorto Sh.Ok, kiu signifas "Shanhajo Oktobro 2010", por pli klare distingi miajn ĉiutagajn raportojn.

Kelkajn minutojn antaŭ la ekflugo al Shanghai, sidante sur mia seĝo 7E, mi deziras dividi miajn impresojn.

Kiel kutime bedaŭrinde mi pakis la valizon lastmomente, la tagon de la forflugo! Feliĉe estis tempo, la ekflugo estas je la 13:40, hodiaŭ vendrede la 8an de oktobro. Cetere tiu tago ne estas ordinara al mi. Estas mia naskiĝtago!!! Eblas do konsideri la vojaĝon komencanta hodiaŭ kiel bela naskiĝtaga donaco.

Pro specifeco de tiu ĉi tago, ŝaltinte la komputilon ĉi-matene, mi ricevis dudekon da bondeziraj mesaĝoj, plejmultaj per la retejo Vizaĝlibro.

Tamen mi devis paki kaj finpaki mian valizon. Mi tre timis, ke mi forgesis kunporti aĵojn. La streĉo estis maksimuma. Des pli ke ofte mi malfruas. Mi timas, timegas, ke forgesis kunporti ion aŭ tion. Feliĉe la elektran konvertigilon mi retrovis lastmomente hieraŭ vespere. Kion mi forgesis ĉi foje, mi ne scias. Bantukon mi intence ne portis, supozante ke estos en la hotelo.

Mi forlasis la hejmon je 11:23, je 11:30 la buso rekta al la flughaveno ekveturis, kaj je 12:12 mi estis en la flughaveno jam, en Roissy Charles-de-Gaulle, terminalo 2F. La vetero tre belas. Blua ĉielo, 19 gradoj.

En la buso mi estis ankoraŭ tre streĉata, do legis retmesaĝojn kaj telefonmesaĝojn, skribis kelkajn.

La registrado de mia valizo glate disvolviĝis, la valizo pezas 16,2 kg. Post dogana kontrolo, unuafoje kun portebila komputilo, alveno en la enaviadiliga halo. Ne estas frizisto bedaŭrinde tie, devos trovi en Ŝanhajo. Aĉeto de multaj manĝaĵ-donacoj: ruĝa bordoza vino, ronda skatolo kun fromaĝaro, ĉokoladoj francaj.

Je la 13a kaj kelkajn minutoj mi jam eniras la aviadilon, iu Airbus A330. Bedaŭrinde seĝo en la mezo. Streĉo jam malaperis. Estos 11 hora flugo. Ĝis tre baldaŭa revido, Ŝanhajo!

## Sh.Ok 2010 n-ro 02: 2-a vojaĝo al Ŝanhajo, 1-a tago—streĉe kaj agrable

Kiel resumi mian unuan tagon en Ŝanhajo? Ĉar estas jam malfrue kaj morgaŭ mi devos vekigi tre frue - ekveturo jam je la 08:20!! - mi ne detaligos tiom, kiom mi komence planis. Fakte mi tute ne povis dormi dum la flugo pro 2 kialoj. Unue, la kondiĉoj estis malbonaj, malhelpaj al dormado. La kompanio ne disdonis okulmaskojn al la flugantaj pasaĝeroj, ne estis individuaj ekranoj sur la seĝoj sed komunaj alte pendantaj kiuj dum preskaŭ la tuta flugo montris filmojn! (kiujn preskaŭ neblis nespekti. Tiel mi revidis parte : "Stormo de viandpilkegoj", "3 amikoj" kaj "17 jaraĝa denove". Krome kaj ĉefe la flughoroj estis aparte malbonaj: ni alvenis je la 1-a horo laŭ la pariza tempo kaj la 7-a laŭ la ĉina tempo. Tio signifas, ke miaj kutimaj dormhoroj malaperis kiel nigratruo en la hordiferenco!!

Pozitiva aspekto de la flugo: la manĝoj, verŝajne la lastaj francaj antaŭ semajno de malfacila netaŭga al mi ĉina manĝaĵo.

En la flughaveno mi eksciis, ke mi estis la unua alveninto el la 9 partoprenantoj, ni renkontis tie la duan, germaninon studentan kaj parolantan la ĉinan, Lydia, tre ĉarman junulinon.

Matene surprizo: venis nia amiko Wang Minhao, la agema kaj amikema prezidanto de la Ŝanhaja Eo-Asocio. Selena transdonis al li la filmon de nia pasintfoja laboro. Mi profitis la okazon por transdoni francajn manĝadonacojn.

Posttagmeze menciindas ĉefe 2 aferoj, vizito al frizisto kaj duŝado sekvita de siesto. Pri la dormado mi ne multe parolos pro evidentaj kialoj: mi forgesis miajn sonĝojn, tamen certe mi sonĝis multe :) estis tre agrable freŝige kaj ripozige duŝi min kaj dormeti.

Antaŭe mi tranĉigis miajn harojn en apuda frizistejo. Estis amuza sperto. La harojn ili ne lavis al mi

antaŭe, sed nur poste. Oni purigis miajn okulojn, kvankam mi tute ne petis tion antaŭe. Mi pensis, ke estas senpaga kromaĵo sed ili volis pagi tion al mi. La frizumado ĝenerale bonis, estis agrable denove havi kurtajn harojn ne tro densajn. Lasta stranga afero estis la har-lavado. Oni ŝampuigis min kiam mi sidis ĉe sama seĝo kaj poste akvumis la harojn petante min klini la kapon antaŭen, side, kaj ne malantaŭen, kuŝe, kiel kutimas en Francio.

Vespermanĝo: mi malfruis je 15 minutoj forgesinte ke la renkontejo estis la 2a-etaĝa manĝejo. Sidiĝis inter Selena kaj japanino Yuka, kiu donacis aĵon al ĉiuj, hontu mi!

Menciindas la interesa maniero sinprezenti laŭ ĉina tradicio: irante al la tablo, mi salutas al organizantoj kaj laborantoj kun glaso en mano kaj tostante kun tiuj. Tiel sinprezentis mi al organizantoj kaj aliaj 7 partoprenantoj. Agrable notindaĵo: estis okazo por mi paroli kelkvorte la rusan, germanan, anglan (kun la juna litovo) kaj itala (kun ĵus alveninta tiam Michela). Pli frue samtage, je tagmanĝo mi iomete babilis ruse kun la belorusa raportistino, estis agrable kvankam mi ne komprenis ĉion.

Mi devis bedaŭrinde forlasi la manĝejon tuj post veno de la desertoj

(melonoj). Ĉar havis vesperan rendezuon kun 4 lokaj esperantistoj: la jam menciita prezidanto de ŜEA kaj 2 junuloj, unu ĉina kaj unu irana. Tre agrable tempo kun ili en kafejo tria-etaĝa trinkante teon kaj vigle diskutante. Estis okazo konstati kiom bone eblas konversacii vigle kaj flue, sen ajna lingvobaro, per la lingvo Eo.

Fine revenis ĉirkaŭ 23-a horo, tempo por labori!

Kaj post ĉio tio, ankoraŭ ne estis ebleco vere festi mian naskiĝtagon.

Eble morgaŭ? Ni tiam vizitos la Ŝanhajan Mondan Ekspozicion. Ĝis morgaŭ, karaj.

## Sh.Ok 2010 n-ro 03: 2-a vojaĝo al Ŝanhajo, Ekspozici-Tago kaj Raportista Laboro

Same kiel hieraŭ, mi emus komenci dirante, ke mi skribos malmulte pro lacego. Mi ne scias, ĉu mi sukcesos fintajpi la raporton ĉi-vespere aŭ ĉu mi ekdormos side.

Mi ŝaltis la televidon por teni min veka. Ĉu tio sufiĉos? Antaŭ 2 horoj kiam mia interpretisto proponis al mi kafon por helpi labori vespere, mi diris ne, mi ne bezonas. Nun mi ekbedaŭras, miaj okuloj emas fermiĝi, mia menso luktadas kontraŭ tiu ilia emo!

Fakte nia tago estis aparte elĉerpiga. Estis la unua tuta program-



tago, ĝi estis dediĉita al la Monda Ekspozicio. Mi ne volis forlasi ĝin posttagmeze, ne sentis lacon, sed nun...! Certe mia nokto, kvankam tre agrabla, dorminta sur bela, 2-persona, dikmatraca lito, ne sufiĉe longis. Hieraŭ mi laboris malfrue. Enlitiĝis malfrue, preskaŭ je la 1-a horo! :( kaj vekigis jam je 06:55. Ĉar ni devis forveturi jam je 08:20, pli frue ol dum miaj oficejaj tagoj! Matenmanĝo estis tre impresa, la elekto estis tre granda kaj feliĉe estis multaj okcidentaj manĝaĵoj.

La unua etapo en la Ekspozicio estis... fakte atendi ricevi la enirbiletojn kaj la rajton eniri. Ni profitis la tempon per bela vetero varmeta babilante, fotante, mi registris sonraporton :)

Fine iom post la 10-a horo ni eniris, busis per 3 grupoj, nia grupo trionigita laŭ ŝajne hazarda kriterio. Mi estis kun la japanino Yuka, la 2 belorusoj kaj kompreneble la respektivaj interpretistoj, kaj laborantoj de la Buroo pri la Monda Ekspozicio.

Unua pavilono vizitita, ankoraŭ je plena konsisto de la grupo, estis la ĉina. Sekvis 2 temaj samkonstruaj pavilonoj, pri Urba Planedo - tre plaĉa- kaj la alia pri Urba Vivado.

Posttagmeze, dividitaj en 3 grupetoj, ni vizitis 3 landajn pavilonojn: Japanio, tute nova al mi; Hispanio, denove kaj fine Francio. En la japana pavilono notindas, ke ni estis bone traktitaj, kiel VIP-oj (Vere Imponaj Personoj). Ĵurnalistoj kaj fotemuloj ricevis komence ĉirkaŭbrakan zonon, sen kiu foti estus malpermesita. Dum la tria kaj lasta programero mi, kaj ne nur mi, dormemis! Devis esti io dormiga



en la filmo. Ankaŭ la ĵus antaŭa tagmanĝo kontribuis je tiu dormiga efekto.

Kio pri la franca pavilono? nu ĝi same impresis kiel pasintfoje: malbone. Aspektis malplene, senenhave. Tamen ĉi foje mi havis la surprizon aŭdi, ke ĝi plaĉis al niaj belorusaj kolegoj. Ili vidis en la pavilono la francan vivstilon, la modon, manĝaĵon, trinkaĵojn, arton...

La kritiko estas relativa!

Antaŭ la 18-a horo estis jam tempo reveni ĉiuj buse al la hotelo, kie atendis nin bufedo en la 29a-etaĝa panorameca restoracio. Sed al mi estis tro frue, mi deziris resti iomete pli longe, oficiale por butikumi. Neoficiale por iri manĝi finfine manĝeblan - laŭ mia gusto - manĝon, en usona reĝ-burga rapidmanĝejo, hontu mi, mi scias! Sed fine mi ne iris, konvinkita de mia akompanantino, kiu devis resti kun mi, povrulino. Do mi simple aĉetumis: ventumilojn, magian tabulon, puzlaj kuboĵ. manĝbastonetojn ankoraŭ ne trovis.

Post tio, lasta promeno en vespera ekspozici-pejzaĝo, la plej belaj vidpunktoj. Ekz. la taiwan-a pavilono, la ĉina, saudi-arabia, festivalejo. Sur baseno estis akvo-spektaklo. Sed ni devis esti saĝaj, obei niajn malsatajn stomakojn kaj lacajn kruojn kaj reveni al la hotelo. Buse kaj taksie. Ĉirkaŭ je 20-a horo estis en la hotelo. Vespermanĝo ĉe belega nokta, luma urba pejzaĝo de Ŝanhajo, kun vido al la rivero Huangpu, la granda ponto, la Perla Turo, la Korktirilo...

Fine manĝebla ĉina manĝaĵo: rizo, nudeloj, bovaĵo... multaj bongustaj desertoj (kukoj, krespetoj, melonoj).

Fine kion mi memoras je tiu longa tago? Mi dirus ne la pavilonoj, ĉar

plej multajn (4 el 6) mi jam vidis, sed mia raportista laboro. Efektive mi faris plurajn sonraportojn kaj intervjuojn, en diversaj lingvoj kun traduko al Esperanto: itale kun Michela, germane kun Lydia, unu eĉ kun ambaŭ samtempe, antaŭ tagmanĝo, iomete kun Gedas angle, kun Tamara ruse. Kaj neformale paroletis ruse kun Lydia kaj Nikolai el Belorusio, angle kun Li Dong/Michael, vespere hotele iomete kun gastino el Meksiko Claudia. Lingvemulo kia mi povis tiel vere satiĝi, eĉ se la stomako malpli.

Denove estos mallonga nokto, jam estas noktomezo kaj duono!

## Sh.Ok 2010 n-ro 04: 2-a vojaĝo al Ŝanhajo, duone en la Ekspozicio, duone kunstreĉe

Ĉi vespere mi ne povos skribi tre multe, ĉar denove mi lacegas, dorminte ankoraŭfoje ne sufiĉe, ĉar mi estis ege streĉita hodiaŭ, pro mia tiel nomata "art-prezento" kiu evidentiĝis ne preta, kaj ĉar morgaŭ ni devos forveturi kaj do ekstari ankoraŭ pli frue ol hodiaŭ. Jam je la 07:30 estos la ekveturo! :(

Mi vere klopodu dormi pli ol 6 horoj ĉi nokte.

Anstataŭ longa komento hodiaŭ, mi promesas disponigi mian pri-ŝanhajan lumbildaron al ĉiuj dezirantoj. Eble ĝi eĉ haveblos en retejo de ĈRI.

La ĉi posttagmeza prezento mia estis preskaŭ katastrofo. Mi eĉ ne



komparas kun la brilaj prezentoj (plej parte kantaj) de miaj kolegoj-partoprenantoj.

Ĉu mi sukcesos eldiri pli da ĉinaj



vortoj ol faris hodiaŭ? Komenti ĉiujn bildojn sen tro tedi la ĉeestantojn? Ni vidos. La hodiaŭa provludado ne estis senutila.

Ĉi matene ni vizitis okcidente de la ekspozicia zono kelkajn kompaniajn pavilonojn: la Ŝtata Elektro-Transportreto, kun impresa lumplena filmo en "magia kubo", Coca Cola, denove, kaj la Ĉina Aviadila, kun la plej bela el ĉiuj film-prezentoj viditaj de mi en la Ekspozicio: 3-dimensia kun okulvitroj kaj simulatoroj en vagonetoj.



Do, bonan nokton al mi! Mi ne malŝparu tro da tempo ĉi vespere. Morgaŭ vekigo planita je 05:55!

## Sh.Ok 2010 n-ro 05: marde 12 10 10, la plej grava tago

23:28, je la unua etaĝo sur ĉetrinkeja fotelo, per la hotela sendrata retkonekto "tsunami".

Antaŭ kelkaj horoj revenintaj al la hotelo per la buso, mi diris, ke



mi ne estas laca kaj ankoraŭ deziras promeni urbe. Nun tamen mi sentas la lacegon. Ĝi ekhezitigis min pri skribi ĉi vespere aŭ ne. Unuflanke pro pigreco kaj laceco mi ne emis skribi. Tial mi neniam skribas tagnotojn kutime, kvankam foje estas raportindaĵoj. Sed aliflanke kiom utilas kaj emociigas relegi monatojn, semajnojn, tagojn poste, por rememori belajn memoraĵojn delonge forgesitajn malgraŭ la baraktado memoradi ilin.

Do kio pri hodiaŭ?

Eblas diri, ke ĝi estis la plej longa tago. Ni devis ekveturi jam je 07:30! Estis aŭtomataj vek-alvokoj al ĉiuj je 06:30, mi vekigis jam je 5:55!!

Ĝi estis ankaŭ la plej emociiga, por tiuj, kiuj havas emociojn. Mi havas nur 3: gaja (aŭ gajeta, pli ofte), malgaja kaj streĉita. Mi sentis 2 el tiuj emocioj hodiaŭ, ĉefe. La 2 lastajn, evidente.

Ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj jam estis en la manĝejo, kiam mi venis tien je 07:00.

Trafik-ŝtopiĝoj estis. Pro tio nia buso alvenis al Ŝanhaja radio-konstruaĵo nur ĉirkaŭ. 1 horon poste. Tamen ni havis pli ol sufiĉe da tempo ĝis la eko planita je la 10-a. La tempo ne estis tro abunda por la virinoj en nia grupo, kiuj devis ŝanĝi siajn vestiĝojn. Michela surmetis belan ruĝan robon, Yuka veran kimono!

Maria ruĝan pantalon-tradician-kostumon.

Ankaŭ la vjetnama viro ŝanĝis sin, surmetis tradician vestaĵon kaj Nikolaj tradician belorusian ĉemizon.

La solenaĵo komenciĝis je 10:07. Je la unua tablo-vico en la salono sidis la gravuloj: estraranoj de la Ŝanhaja disaŭdiga centro, de la komunika Oficejo de la Ekspo-Buroo kaj de la ĈRI.

Unue salutparolis ĉiuj gravuloj, ĉine. Poste venis la artprezentoj, lerte enkondukitaj de la prezentisto Haibo.

Tiam mi vere konvinkigis, ke ĉiuj partoprenantoj estas artistoj, artemaj aŭ eĉ talentuloj - krom mi. Mi demandis min, kion mi faris tie meze de ĉiuj ili. Post niaj artprezentoj ni ĉiuj ricevis de malsama estro la premiojn: enkadrigitan ateston kaj grandan pluŝon de Haibao ... ne de Haibo la prezentisto.

Je la 12-a kaj iom finiĝis la solenaĵo, post grupa fotado kaj individuaj fotadoj.



Tiam mi tamen sukcesis doni miajn 2 plej grandajn donacojn, la vinon kaj la fromaĝaran skatolon.

Buso al urba luksa restoracio, kie ni iris al la 2D etaĝo. Nin atendis en granda salono 4 tabloj kaj scenejo, kie denove salutparolis kelkaj gravuloj. En la meza plej granda







tablo sidis la gravuloj. La kandidatoj estis dividitaj en 2 tabloj. Mi estis kun Lydia, Gedas kaj Yuka plus la respektivaj interpretistoj kaj la prezentisto.

Posttagmeze la plano estis viziti lokan familion, ni ekis je 14:10. Poste busis al la ĉina gastiga familio. Tiam estis la parto plej malstreĉiga de la tago, eble de la semajno. Ni ludis diversajn eksterajn ludojn, trinkis verdan teon en tasetoj, spektis la elsendeton pri ni en CCTV, kie aperis la vjetnamo, la bulgarino kaj la germanino intervjuita. Fine subskribis oran libron, preparis iajn rolitajn manĝaĵetojn, kaj vespermanĝis, jam je 17-a iom! Miatable estis la 2 belorusoj, kun ilia aminda interpretistino, Selena, juna ĉina raportisto.

Ĉirkaŭ je la 18-a reveno al la hotelo. Iris al la 1a etaĝo, kie sidis kaj trinkis Yuka kaj interpretistino. Mi profitis la okazon por intetvjueti Yuka en la angla, ŝi afable proponis al mi trinki ion, mi elektis koktelon "Alexander".

Post kelkaj minutoj surprize - kaj tamen atendite - alvenis Ĝoja, mi estis tre ĝoja pro ŝia alveno. Vespere promenis ni bedaŭrinde subpluve, metrointaj al la Popola Placo per linioj 4 kaj 2 (biletoj 4 CNY tien). Ĝoja kiu ne manĝis ekde tagmanĝo en la aviadilo, profitis, ke ni estis sur Nankina strato por aĉeti manĝaĵon en usona rapidmanĝejo :(

Je 22:38 ni estis revene en la hotelo. Kiom longega, emoci- kaj aktivplena tago, ĉu ne ?!

Oj denove tro malfruas, jam estas 00:35 :( wan an!

## Sh.Ok 2010 n-ro 06: Turisma tago tra Ŝanhajo, inter malnova kaj moderna urbĵ

Hodiaŭ estas fruktodona, mi vizitis multajn vidindaĵojn en Ŝanhajo, kiel Ĝardenon Yuyuan, Nankinan Straton, la duan altan turon de Ĉinio, Ŝanhajan Mondan Financan Centron (ŜMFC) kaj ni forveturis por krozado sur la rivero Huang-pu. Tiu ĉi perŝipa promeno certe estis la plej memorinda, ĝuinda momento de la tago. Eĉ antaŭ la SMFC!



• Aleks Kadar en Ĝardeno Yuyuan



• Aleks Kadar aĉetis donacojn en Ŝanhaja Monda Financa Centro



• Aleks krozadis sur rivero Huangpu

## Sh.Ok 2010 n-ro 07 : Ĵaŭde 14 10 10, lasta programa tago, subpluva duontaga ekskurso

Snif, hodiaŭ jam estas la lasta komuna tago, kun organizantoj, akompanantoj (interpretistoj) kaj partoprenantoj. Ĉi matene devis ni forveturi je la 8a horo, denove tre frue! Pro tio hieraŭ vespere mi deziris enlitiĝi ne tro malfrue. Mi sukcesis tion atingi komencante mian tagraporton en la buso ptm kaj finskribante ĝin haste vespere, revene post la ŝip-krozado. Tiel enlitiĝis je 23:35. Ĉi-matene vekigis per la ĉambra alarmo kaj telefono je la 06:25! Alvenis en la manĝejon je 07:20 kaj estis preta je la 08:05, kun nur 5-minuta malfruo ĉi-foje.

La hodiaŭa programo konsistis je duontaga (matena) ekskurso al ekster- sed apudurba malnova urbo, Zhao io, kies precizan ĉinan nomon mi jam forgesis. Temas pri urbo simila al Venecio, kiel diris nia juna ĉiĉerono. Ni alvenis tie preskaŭ je la 10a horo kaj reveturis el tie je la 11a kaj kelkaj minutoj. Estas iom stranga kaj bedaŭrinda tempo-planado laŭ mi veturi pli ol 3 horoj por promeni surloke apenaŭ pli ol unu horon. Des pli bedaŭrinde, ke la vetero tute aĉis, aĉegis. Pluvis, pluvadis. Ne taŭgaj kondiĉoj por viziti belan urbon kun kanaloj kaj ĝardeno, malpli granda ol tiu en Yu Yuan sed tamen okul-alloga ankaŭ. Pri la aspekto de tiu sufiĉe ĉarma loko, mi konsilas pli bone vidi la fotojn aperontajn ĉi-tie aŭ aliloke en la reto.

Ni revenis al la urbo Ŝanhajo por tagmanĝi en iu restoracio laŭdire de iu ĉina malplimulto. Se oni diris al mi ĝian nomon, mi ĝin jam tute forgesis. Ne multe komentindas la manĝo miaflanke. La organizantoj petis nin kunporti niajn ĉambrajn akvo-boteletojn, tiel mi havis ion por trinki. Pli bone ol kolao. Ni estis dividitaj en 3 tabloj, unu kun la



## Ĝeneralaj komentoj pri la semajno

La aliaj partoprenantoj.

**Nha (Vjetnamio)** : mi kontentas, ke finfine hodiaŭ mi konas lian nomon, parolinte iomete kun li en la buso, por peti lian adreson. Li estas vera talentulo pri muziko, kiun li kredeble studas. Kaj ankaŭ talentulo pri la ĉina lingvo. Ŝajnas al mi, ke li nun loĝas en Ĉinio, kio klarigus lian brilan nivelon ĉinlingve. Li povis paroli la anglan kun ne-ĉinlingvaj partoprenantoj. Nomon de lia akompanantino mi ne konas.

**Maria (Bulgario)** : malmulte mi parolis kun ŝi dum la semajno, kvankam mi povus fari tion ruse aŭ angle. Petante ŝian adreson en la buso, mi hodiaŭ malkovris, ke ŝi estas estrino de 3 asocioj en sia urbo Ruse! Unu el ili temas pri Bulgar-Ĉina amikeco-asocio. Profilo simila al tiu de Yuka, do. Nomon de ŝia akompanantino mi ne konas.

**Yuka (Japanio)** : ankaŭ kun ŝi mi malmulte parolis, kvankam ŝi povis paroli iomete la anglan. La ĉinan male ŝi bone regis, laŭ mia kompreno. Ŝi sciigis al mi, ke ŝi havas 7 laborojn! Kateca virino! Kantistino, aktorino, estrino de lernejo en Ĉinio apud Pekino, instruistino pri bona konduto ktp. Do, mult-talentulino. Nomon de akompanantino mi ne konas.

**Gedas (Litovio)** : tre alta knabo, mi ne scias ekzakte kiom li aĝas. Hodiaŭ jaŭde mi eksciis la adreson de la blogo, pri kiu li parolis sursceneje dum la solenaĵo marde matene. Dum tiu solenaĵo li kantis mem verkitan kanton kun gitara akompano. Lia interpretisto estas Michael (Li Don), kiu havas tre amuzan fortan usonan akĉenton, kiam parolante la anglan.

**Nikolaj (Belorusio)** : maljuna, li mem malferme konfesas (56 jaraĝa), li kantis, dum la solenaĵo, belarusan tradician kanton. Bravulo! Pasigas la tutan tempon krokodilante

organizantoj, Nha (la vjetnamano) kaj Maria (la bulgarino). Unu kun Gedas (el Litovio) kaj Lydia (el Germanio). Kaj la mia, kun la belorusoj (tio estas kun ilia interpretistino ankaŭ!) kaj Michela (kaj ŝia akompanantino Serena). La surscenejan spektaklon de dancistoj tradicie kostumitaj ni grandparte maltrafis. Ĉu bedaŭrinde? Ĉiokaze ni sidis iom for de la scenejo. La manĝaĵo ne aspektis al mi tre diferenca je kutime, sed mi ne estas la plej taŭga persono por juĝi, manĝinte denove la « striktan minimumon », tio estas rizon kaj iom da viandaĵo.

Ni revenis ĉirkaŭ la 13:30, disponante je 3 liberaj horoj antaŭ rendevuo por iri vespermanĝi ie. Mi profitis tiun tempon komencante skribi mian tagnoton, per la portebla komputilo enĉambre. Je la 17a kaj iom, ni forbusis manĝi en Huhei, en restoracio situante je 5a etaĝo de tre moda kaj moderna komerca centro, Shanghai Times Square. Mi ne diros, kiudevena manĝo estis, vi jam divenis! Nin atendis privata salono, kun 2 tabloj. Tre intima kaj komforta loko! La komentinda afero pri tiu lasta komuna vespermanĝo estas, ke ĝin antaŭis granda aktiva foto-sesio. Ĉiuj fotiĝis kun ĉiuj, preskaŭ! Originalaĵo, unuafoje estis foto de la interpretistoj. Bona ideo, ĉar ĉiuj ili ankoraŭ ĉeestis, male al la partoprenantoj, kiuj perdis forirantan Yuka. Kroma rimarkindaĵo dum la vespermanĝo estas, ke estis multaj tostoĵoj, « ganbej-umadoj », mi dirus, ĉinesperante. Kaj talente distris nin gitare Nha. En la fino estis eĉ iom da dancado dank'al gitar-ludado kaj kantado de Nha, ankaŭ en la rusa (originala versio de Apudmoskvaj vesperoj) kaj angla. Hodiaŭ mi petis la adresojn al tiuj, kiujn mi ne estis aldemandinte antaŭe. Same faris vespere Gedas.

Ni revenis ĉirkaŭ la 21a (ĉu ? mi ne plu certas), restis multe da laboro fareda tiun lastan vesperon.







kun Lydia, samlandanino kaj raportistino en la « Popola Gazeto » (Narodnaja Gazeta). Mi sufiĉe ofte diskutis, aŭ provis diskuti kun ili, sed iom malfacilis al mi en la rusa. Akompanantino-interpretistino : Tamara.

**Lydia (Germanio) :** mi sufiĉe multe diskutis dum la semajno, pro lingvaj kialoj. Tre alta, la dua plej alta en nia grupo. Tre simpatia kaj tre lerta pri la ĉina, kiun ŝi lernas ekde nur 2 jaroj! Kun 21 ŝi estas la plej juna partoprenantino. Ŝi partoprenis ĉinan kantkonkurson, en kiu ŝi finiĝis 2a en Germanio. Gratulon! Ŝia akompananto estas Li Yen (Frank).

**Michela (Italio) :** ankaŭ kun ŝi mi multe babilis dum la semajno, samkiale. Tre simpatia. Italeca (parolas multe per la manoj ;) ) Lernis la ĉinan en Romo dum 4 jaroj. Partoprenis nelonge antaŭe internacian konkurson pri ĉina kantarto, en kiu ŝi estis inter la 30 plej bonaj (el ĉ. 108). Bravulino! Akompanantino: Serena.

Jes, vi bone kalkulis, ni estis nur 8, anstataŭ la anoncintaj 9. Lastminute, ial, ne povis veni la usonano. Deka partoprenanto rezignis jam antaŭe.

### Interpretistoj

Amuze - sed utile por mi por povi pli facile nomi ilin - estas, ke ili havis kromnomon rilatan al ilia

laborlingvo. Ekzemple Selena kaj Ĝoja (Esperanto), Serena (itala), Michael (angla), Tamara (rusa)...

Dua notinda afero. Iuj estis pli utilaj kiel interpretistoj ol aliaj. Tio estis la kazo de la interpretistoj, kiuj laboris por kandidatoj tute ne, aŭ apenaŭ, ĉinlingvaj. Mi menciis ĉefe la bulgaran kaj anglan. Al aliaj kandidatoj, amuze estas, ke la interpretistoj ne rolis kiel interpretistoj, ĉar tiuj kandidatoj jam flue ĉinlingvaj ne bezonis aŭ preskaŭ ne bezonis interpretadon.

Fakte resumeblas, ke la interpretistoj estis plurtaskaj, mult-utilaj. Ili rolis kiel akompanantoj, interpretistoj kaj raportistoj, kiuj ĉiutage kolektis la impresojn de ilia respektiva akompanato.

### Prilingvaj rimarkoj

Estis unu el aferoj, kiujn min antaŭinteresis venonte al Ŝanhajo por tiu semajno. Kiel interkomunikos la kandidatoj? Kiel komunikos la organizantoj kun la partoprenantoj? Ĉu estos iu komuna lingvo inter ĉiuj? Mi timis, ke povus esti la angla. Ĉu la partoprenantoj grupiĝos laŭ lingva grupo ?

Nun, ke la semajno oficiale finiĝis, eblas tiri kelkajn konkludojn tiukampe. Kiel dirite, la 2 belorusoj ĉiam restis unu kun la alia kaj krokodilis. Kelkfoje parolis kun ili, ruse, la bulgarino. Malpli ofte,

kvankam foje, la litovo, kiu bone komprenas la rusan sed malpli parolas (aŭ parolemas ĝin), pro lando-politikaj kialoj. Interesa afero estas do, ke la rusa lingvo estis la 2a plej parolata lingvo en la grupo, for post la ĉina. Eble la angla estis pli multe regata, sed malpli uzata, ĉar nur unu kandidato havis la anglan kiel laborlingvo. Stranga afero fakte tiu, ke estis la juna litovo. La angla povus roli kiel komuna lingvo inter ĉiuj, sed tio ne okazis, la organizantoj ĉiam parolis ĉine kaj fidis la interpretistojn por enorele murmure interpreti.

Tre impresis min la unuafoje al mi vidita rolo de la ĉina kiel komuna lingvo, dua lingvo inter italino kaj germanino! Kiu povus imagi, ke 2 neĉindevenaj eŭropanoj uzus la ĉinan kiel interlingvon?!! Mirinda sperto. La vjetnamano kaj la japanino ankaŭ brile parolis la japanan. Do, inter 8 kandidatoj, 4 parolis bone la ĉinan. Mi havis la plezuron povi ekzerci kelkajn lingvojn: krom la ĉiutage uzita Esperanto, la rusa, paroletata kun la ruslingvanoj, la itala kaj la germana; la angla, iomete kun la alilingvanoj. Kelkajn vortojn de la hispana interŝanĝis kun uzanto de la libera komputilo 1a-etaĝe kaj kun meksikanino sametaĝe.

### La ĉina

Temas pri la ĉina lingvo, kompreneble. Mi tre ĝeniĝis esti inter la 3, kiuj plej nule parolis ĝin. Paroli la ĉinan estas pli ol pluse, estis tre aprezata. Multe da sukceso rikoltis la ĉinlingvaj kantintoj dum la marda solenaĵo, la publiko emis kunkanti kun ili. Kaj tiuj kandidatoj povis paroli kun ĉiuj organizantoj, povis impresi la prezentiston, povis elturniĝi en la komercejoj, komuniki kun lokanoj kaj ĉinaj turistoj.

Mi bedaŭras, ke mi ne povis paroli ĉine al la prezentisto, kiu demandis kiel statas mia kono de la lingvo. Des pli bedaŭrinde, ke post kiam li faris tiujn demandojn al mi dum la prov-prezentoj lunde ptm, li ne plu

► P. 14



## Renato Corsetti: Agu en arablingvaj landoj

**Renato CORSETTI (naskita la 29-an de marto 1941 en Romo) estas itala esperantisto kaj lingvisto, eksa prezidanto de UEA (ĝis 2007), kaj respondeculo de la Komisiono de UEA pri Agado en la Landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko. Antaŭ la 4a Mezorianta Kunveno, okazanta marte en Karaĝo, Irano, li akceptis specifan intervjuon de Mikrofone, kuriero de la Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia. Dume, li direktis nian atenton al la nuna stato de E-movado en arablingvaj landoj kaj UEA-peno por disvastigo de Esperanto en tiu regiono.**



**Mikrofone:** Gazetaraj komunikoj de UEA informas, ke la 4a Mezorianta Kunveno okazos marte en Karaĝo, Irano. Pro kiaj konsideroj UEA prenis Karaĝon kiel kunvenurbon el kandidataj urboj?

Renato Corsetti: Oni akceptis la proponon de iranaj esperantistoj, ĉefe ĉar estas multaj esperantistoj en Irano kaj tre malofte oni havas la okazon renkonti ilin kaj vidi la staton de la movado tie. Ni esperas, ke ĉi tiu okazo permesos pli bonan interkonatiĝon inter iranaj kaj eksterlandaj esperantistoj.

**Mikrofone:** Okaze de la 4a Mezorianta Kunveno, ni preferas informiĝi pri disvastigo de Esperanto en arablingvaj landoj. Kiam la lingvo Esperanto debutis en arablingvaj landoj? Ĉu la historio estas malnova?

Renato Corsetti: La rilatoj inter araboj kaj la internacia lingvo Esperanto en arablingvaj landoj estas tre malnovaj. La unua lernolibro por araboj estis eldonita en Romo en la jaro 1908-a. En la jaroj 1920-aj ekzistis ia Egipta Esperanto-Asocio, kies membroj estis ĉefe eŭropanoj. Ĝi ne multe prosperis, malgraŭ la kursoj laŭ la metodo Cseh, kiuj L.N. Newell gvidis en Egiptujo en la jaroj 1933-35. En 1944 la refondita asocio agadis inter soldatoj kaj militkaptitoj. Malgraŭ la malforteco de la egipta asocio, estis ankaŭ kontaktoj kaj interŝanĝoj de vizitoj inter egiptaj kaj israelaj esperantistoj.

Novaĵo estis la fakto ke la konata esperantisto Paul Neergard gastprofesoris en la Amerika Universitato en Bejruto, Libano, kaj ankaŭ instruis Esperanton tie. Sekvis

fondo de la Libana Esperanto-Asocio, kiun prezidis dum multaj jaroj profesoro Salah Ghanem.

Ankaŭ en la 1960-aj jaroj daŭris episodaj aktivadoj. En 1966 estis korespondaj kursoj en Irako ankaŭ por homoj el aliaj arabaj landoj. En 1968-69 konata egipta esperantisto Nassif Isaac eldonis en Egiptujo du verkojn: Esperanta-Araba Poŝvortaro kaj Esperanta-Araba Lernolibro.

Grava evento estis la eldono de la Korano en 1969, tradukita de italo, Italo Chiussi. En 1970 la iraka Ministerio pri Kulturo petas raporton pri la utiligo de Esperanto en Turismo planante eldonon de broŝuro.

En la postaj jaroj la agado estas malpli intensa ol kutime kaj oni registras nur la eldonon de la verkoj de Georgo Abraham, arabo loĝanta en Argentino. En la mezo de la 1990-aj jaroj estis fondita la Araba Komisiono de UEA, kiu poste ŝanĝis sian nomon al Komisiono pri agado en la Landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko.

**Mikrofone:** Ĉu ni povas diri, ke la Komisiono pri Agado en la Landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko estis fondita de UEA precipe por akceli disvastigon de Esperanto en arablingvaj landoj?

Renato Corsetti: Jes, ĝuste tial! Fakte en la nuna momento Esperanto estas jam konata kaj uzata en ĉiuj partoj de la mondo, de Siberio al Suda Ameriko, sed ĝi estas tre malforta en arablingvaj landoj. Se ni ne sukcesas enkonduki Esperanton tien, ni ne povos havi vere tutmondan kulturon en Esperanto kaj ni ne povas diri ke Esperanto estas vere tutmonda.

**Mikrofone:** Post la fondiĝo, kiajn penojn la komisiono jam faris tiucele?

Renato Corsetti: La komisiono provis kolekti ĉiujn esperantistojn ekzistantajn en tiuj landoj kaj provis helpi ilin disvastigi Esperanton. Ni ankaŭ provis jam en la komenco aperigi anoncon en arablingva ĵurnalo en Jordanio kaj la rezulto estis granda nombro da petoj de lernolibroj, kiujn UEA sendis senpage. Tiam ni provis ekestigi retajn kursojn en Esperanto. Estis tradukita la usona 10-leciana kurso. Intertempe pretis ankaŭ la traduko de "lernu.net" al la araba. Tiuj retaj kursoj jam portas kelkajn rezultojn en la formo de junaj araboj, kiuj abrupte aperas en Sauda Arabujo aŭ en Sirio kaj jam konas la internacian lingvon. Krome ni provis provizi novan version de la Korano en ambaŭ lingvoj, la araba kaj Esperanto. Fine ni alvenas al la organizado de la mezorientaj kunvenoj. La unua okazis en Amano, Jordanio, en la jaro 2008-a. La postaj du okazis en



Turkujo en 2009-a kaj 2010-a.

**Mikrofone: Laŭ via opinio, en kia stato estas la nunaj E-aktivadoj en arablingvaj landoj?**

Renato Corsetti: La situacio estas malsama en la malsamaj landoj. Ĝi estas pli bona en la pli periferiaj landoj. En la nuna momento esperantistoj amasiĝetas en la golfaj landoj, ĉar tiuj landoj enportas fremdajn laborantojn, inter kiuj estas kelkaj esperantistoj. Tre bona ĝi estas en Turkujo (ne arablingva lando sed tamen mezorienta), kie ekestis kelkaj tre bonaj agantoj kaj aparte en unu lernejo en Istanbulo estas kreiganta nova esperantista generacio.

Io okazas ankaŭ en la aliaj landoj, sed temas pri iniciatoj de grupetoj aŭ de individuoj. Iom pli rimarkinda estas la ĉeesto de esperantistoj en Maroko.

**Mikrofone: Kio estas la nunaj politikoj de UEA en arablingvaj landoj?**

Renato Corsetti: Fakte la Komisiono de UEA pri Agado en la Landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko siaflanke donas favorajn politikojn laŭ la realeco de Esperanto-disvastigo en arablingvaj landoj. Ĝenerale dirite, tiuj politikoj jenas: (1) Anoncado pri Esperanto en arablingvaj ĵurnaloj kaj dissendado de lernolibroj kaj vortaroj de Esperanto; (2) Organizado de tutsemajnaj kursoj/seminarioj, internaciaj renkontiĝoj tie, kie estas lernantoj, ekzemple en Maroko aŭ Alĝerio sed ankaŭ en la Meza Oriento; (4) Sendado de libroj por ke ekestu lokaj bibliotekoj de Esperanto-libroj; (5) Verkado de informiloj. Se eble verkado de artikolo kaj proponado de ĝi al arablingvaj revuoj; (6) Informado tra la reto pri ekzistantaj retaj kursoj; (7) Eldonado de materialoj el la araba en Esperanto; (8) Trovado de moderna verko tradukinda; (9) Ekdistributado de nova traduko de La Korano rete; (10) Renkontiĝo de iuj mezorientaj esperantistoj en neŭtrala lando en ĉiu jaro. En 2008 estis en Amano, Jordanio, en 2009 en Iznik, Turkujo, en 2010 en Eskişehir, Turkujo; (11) Instigi la verkadon de pli da artikoloj pri arabaj kaj islamaj temoj por Vikipedio.

**Mikrofone: Via opinio, ĉu sufiĉas tiuj politikoj? Se ne, kio estas via propono?**

Renato Corsetti: Tiuj agado-punktoj sufiĉas se la agantoj estus multaj. Ĉar la agantoj ne estas multaj, ni certe devas provi pensi pri io alia, sed estas malfacile aliri tiel grandan "merkaton" kaj tiel "malfacilan" merkaton sen financaj rimedoj por munti grandan informkampanjon. Aliflanke ankaŭ tia granda informkampanjo ne certe donus abundajn fruktojn. Io ankoraŭ ne estas matura en la araba mondo por temoj kiel Esperanto. Tiuj landoj ankoraŭ ne atingis stabilecon, sekurecon pri si mem, kaj

sekve bonan malfermiĝon al la mondo. Samtempe aferoj de ĝenerala bono, kampanjo por plibonigi la mondon, ktp. ne estas ankoraŭ tro popularaj en arablingvaj landoj.

**Mikrofone: Ĉu registaroj de la arablingvaj landoj montris kaj montras sian simpatian al Esperanto?**

Renato Corsetti: Ĉar la Esperanto-movado ne estas tre forta en arablingvaj landoj oni ankoraŭ ne alvenis al situacioj, en kiuj la registaroj devas esprimi sin pri Esperanto. Kiam tio okazis la opinioj estis favoraj. Tio okazis, ekzemple, en Irako en la 70-aj jaroj, kiam la ministerio pri turismo intencis eldoni broŝuron en Esperanto. Jordana ministro prelegis en esperantista seminario antaŭ la UK. Tute aparta kuriozaĵo povas esti konsiderata la favoro de la kolonelo Ĥadafi por internacia lingvo en la estonta tempo, pri kiu li mem verkis en sia libro pri la ĝeneralaj evoluoj de la mondo.

**Mikrofone: Ĉu vi optimismas pri la futuro de Esperanto en tiu regiono?**

Renato Corsetti: Mi certe optimismas. Ne estas principaj demandoj pro kiuj Esperanto ne devus enradikiĝi en arablingvaj landoj. Evidente ĝi progresos tie kongrue kun la materia kaj ideo progreso de tiuj landoj.

**Mikrofone: Ĉu vi volas diri ion plian ĉefe por inviti esperantistojn partopreni la vizitadon al la iranaj esperantistoj?**

Renato Corsetti: Mi petas vin nur represi tion, kion ni aperigas en la enkonduka paĝo pri tiu kunveno:

Kvara Mezorienta Turisma Kunveno  
"Esperanto sur la Silka Vojo"

La Komisiono de UEA pri Agado en la Landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko (MONA) kore invitas vin al la kvara Mezorienta Kunveno, organizata de ĝi, kiu okazos en Karaĝo, Irano, inter la 25-a (vendrede vespere) kaj la 29-a (Marde vespere) de marto, 2011!

Tiu ĉi evento estigas maloftan eblecon renkonti samideanojn el diversaj landoj en la meza oriento (tamen, kore invitataj estas ankaŭ partoprenantoj el ĉiuj aliaj mondpartoj), turismumi, interkonatiĝi, pridiskuti gravajn kaj interesajn temojn en tiu ege bonveniga lando.

Dezirantoj ekskursi antaŭ- kaj post-aranĝe al vizitindaĵoj povos fari tion kune antaŭ aŭ post la kunveno.

Ĉe ĉi tiu paĝaro vi povas legi pri la progreso de la organizado, informiĝi pri la lokoj, pri la programo kaj pri la partopren-kotizoj, (nepre!) aliĝi, kaj vidi kiuj aliaj jam aliĝis.

Kaj se vi havas iun ajn demandon, proponon, problemon, plendon aŭ alian dirindaĵon ne hezitu skribi al la organiza teamo: [mezorienta.kunveno@esperanto.org](mailto:mezorienta.kunveno@esperanto.org).

## ◀ P. 11

starigis ilin la grandan tagon, marde! Kvankam mi estis preparinte, dank'al Michela, ĉinan kanteton kaj pli bonan respondon al la demando «Kial vi ankoraŭ ne eklernis la ĉinan?» . Lunde, mi diris «eble mi eklernos ĝin poste», marde mi estus dironte «ĉar mi prefere lernas lingvojn de najbaraj lingvoj, al kiuj mi vojaĝis aŭ vojaĝos, sed mi tute ne imagis, ke mi vojaĝos 2foje samjare al Ĉinio, mi ne imagis, ke mi tiom frue vojaĝos al Ĉinio!». Kaj do marde mi povis nek kanti «Frato Jakvo» en la ĉina nek diri tion. Cetere, Selena ial ne deziris, ke mi diru la nuran de mi lernitan frazon «Ĉing wenn cesuo dzaj na are ?» . . .

Dum la semajno dank' al Ĝoja mi lernis kelkajn aliajn vortojn: "Wo shi fa guo ren" (Mi estas franco), "Wo lai zi fa guo" (mi venas el francio.) ...

### Organizado

Mi devas konfesi, ke la organizado min ege impresis. Sekve mi deziras sincere kaj tutkore gratuli al la 3 organizantaj organizaĵoj: la Ŝanhajan radion, la Buroon de la Monda Ekspo, kaj laste sed ne balaste, la Ĉinan Radion Internacian (CRI), kiu estis la plej videbla el tiuj.

La semajno dividiĝis je 3 partoj: unue, la vizitado al la Ekspo; due la premi-disdonada solenaĵo post preparado al ĝi; trie la turismado. Certe plej plaĉis al mi la 3a parto, ĉar la Ekspo-n mi jam parte vizitis antaŭe. Tamen kelkaj pavilonoj novaj al mi tre plaĉis: la Ĉina Aviadila, la Ŝtata Elektro-reto (State Grid, en la angla), la Pavilono de Estonto, Urba Planedo, kaj iomete la japana. Kio estis admirinde, estis, ke samtage ni vizitis pli ol 5 aŭ 6 pavilonojn, dum malpli ol la tuta tago. Ĉu eblas tio al normalaj turistoj? Dirindas, ke la franca pavilono same senluziĝis min kiel pasintfoje, eĉ se ŝajnis al mi, ke la bildoj estis pli bone prezentitaj, kun pli da spaco inter ĉiu el ili. Eble mi eraras, mismemoras. Plej plaĉis al mi la turismuma parto, kvankam

kelkajn vizitindaĵojn mi jam estis vidinte. Ĉiam estas plezurego al mi promeni sur Waitan (la Bund), admiru la ĉielskrapulojn vid-al-vide de ĝi, paŝi sur la Nankina strato. Plie estis novaj aferoj: ni vizitis la ĝardenon en Yu Yuan, supreniris en la SMFC (Ŝanhaja Monda Financa Centro) anstataŭ la Perla Turo. Okazis tiu ŝanĝo de plano ĉar estis tro da vico en tiu lasta. Feliĉe por mi. Kaj por ĉiuj, certe, ĉar pli belas la vidpunkto el SMFC. Kial? Ne nur ĝi estas pli alta, la plej alta turo en Ŝanhajo. Sed ĉefe de ĝi videblas la Perla Turo!! Tio evidente ne eblas, kiam oni estas en la Perla Turo. Samkiale mi ĉiam konsilas al turistoj viziti en Parizo la Turon Montparnasse anstataŭ la Eiffel Turon. Inter ĉiuj spertitaj travivaĵoj plej plaĉis al mi la ŝipa krozado merkrede vespere, je la 21a. Kiom belega panoramao, fronte al ĉiuj tiuj altaj turoj, la Perla Turo, la SMFC kaj la aliaj. Kaj ankaŭ la Bund. Kaj nokta moderna parto de Ŝanhajo ĝenerale. Ravanta vidaĵo.

Dum la tagoj apenaŭ eblis enui. Foje mi bedaŭris, ke ni revenis tre frue al la hotelo kaj havis longan liberan tempon, dediĉotan al la laboro. Tio kaj la luksaj kondiĉoj donis kelkfoje al mi la impreson esti en ora malliberejo. Certe agrabla malliberejo kaj ne tre malagrabla laboro, des pli, ke tio estis malalta

prezo pagenda kompanse al tiom da lukseco kaj da malavarego.

### Manĝo

Vere rimarkindas, ke ĉiam, absolute ĉiam, ni manĝis ĉirkaŭ rondaj tabloj! Kun turnanta vitra tavolo en la centro, sur kiujn la pladoj estis metitaj. Tre multaj fiŝoj. Ĉiumanĝe estis fiŝoj kaj maraĵoj... Videble la ŝanhaja manĝaĵo estas pli fiŝa ol la pekina.

### Vetero

Komence de la semajno estis tre agrabla vetero, ne tre varma sed sufiĉe, 20 kaj iom gradoj. Fine, bedaŭrinde, pluvadis, kiam ni estis en Yu Yuan kaj en la venezieca malnova urbo.

### Konkludaj vortoj

La semajno estis belega. Kiel diris Michael / Li Don post la lasta vespermanĝo en la buso, certe ĝi estos neforgesebla kiel bondeziroj farataj okaze de pasanta stelo. Eblas havi agrablan tempon ankaŭ ekster Esperantio. Tiu-foje estis per-Esperanto pli ol por-Esperanto kaj ol en Esperantio.

Foje dum la semajno mi estis streĉita (antaŭ la artaj prezentoj), eĉ malgaja, iujn momentojn (post la artaj prezentoj, foje vespere ; je foriro de Selena). Sed la ĉefa sento, kiun mi havis, estis ĝojeco. Kaj kompreneble seleneco...





## Mikronovelo – 微型小说



## La Deziro de Infano

Depost transloĝiĝo al nova etaĝdomo, la loĝkondiĉo de la familio de Ĵonjo multe ŝanĝiĝis. Nun, sidante sur sofo ŝia patro iam ne bezonas fleksi la gambojn. Kaj la avo povas ludi tajĝiĉuan eĉ en la ĉambro. “Jen kiel ĝoja vi estas!” diris la avino kun rideto al la avo.

Kiel membro de la familio, Ĵonjo ŝajne ne tre kontentas pri tio. Komence ŝi veturis de unu ĉambro al alia per triciklo kaj kriis hupe. Sed nun ŝi tute malviglas. Tuttage ŝi jen paŭtas foliumante infanan bildgazeton, jen senpense sidadas sur bambua seĝeto. Nur en la tempo, kiam ŝi aŭskultas la porinfanan disaŭdigon “Trumpeteto” aŭ birdeto preterflugas antaŭ la balkono, ŝiaj grandaj okuloj ekbrilas.

La avo nutras la birdeton en la kaĝo kaj ridetante diras: “Ĵonjo, recite por mi poemon?” “Jes.” Ĵonjo kapjesas.

Anser’, ansero, ho ansero,  
kantas kun kapo al ĉielo.

La blankaj plumoj ludas ondojn;  
la ruĝaj palmoj pentras rondojn.

Hodiaŭ ŝi recitas tre malrapide.

“Hm, tre bone, nun alian.”

La poemon Ĵonjo ripetas per trema voĉo.

“Aj, ankoraŭ la saman vi recitis. Mi instruis al vi pli ol tridek poemojn!”

“Mi amas nur ĝin!..” Ĵonjo turnas sin duone. Larmoj perlas sur la vangojn.

Dum siesta infana voĉo penetras en la orelojn de la avo:

“Kiel bela via ruĝa beko!  
Bonvolu kanti al mi, ĉu bone?”

“Kial ne? O – mi jam komprenas, kion vi deziras!”

“Ve – tiel? Mi ellasu vin el la kaĝo, sed, vi devas fari ion por mi: Rapide flugu al la antaŭa korto kaj diru al Jenjo, Manjo kaj Bonjo, ke mi tre sopiras al ili kaj ankaŭ al la malgranda kabano. Diru al ili, ke

ili ne transloĝiĝu al etaĝdomo, ĝi estas kiel granda kesto, en kiu estas sufoke, mallibere.”

“Rapidu, ne zorgu min, mia avo estas bona...”

La birdeto kun ruĝa beko forflugas kun svingiĝantaj flugiloj.

Sed la avo, kvankam surprizita, ne moviĝas en la lito. Ĵonjo staras rigide sur la balkono kaj fikse rigardas malproksimen. Ĉu la birdeto forbekis ŝian koron? Aŭdiĝas obtuza bruo de argano el malproksima loko.

“Kesto, kesto...” murmuris la avo mallaŭte. Subite liaj okuloj eklumas. Li leviĝas kaj vekas la maljunan kunulinon. “Maljunulino, ne estas ankoraŭ vartejo en nia kvartalo. Ni do fondu infanan ludejon en nia hejmo, ĉu bone?”

## Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



Esperanto service, CRI-36

China Radio International

P.O. Box 4216 Beijing, China 100040

Tel: +8610 68891940

+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

Retadreso: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉefredaktoro: Zhao Jianping

Redaktoroj: Wang Fang

Xiao Henggang